

De la Federación Española de Esperanto

ESPERANTO

ANO 38 N° 275 MAYO - JUNIO 1986



INAUGURO DE CALLE IDIOMA ESPERANTO EN
LOS ALCAZARES (MURCIA)

**BOLETIN DE LA
FEDERACION ESPAÑOLA DE
ESPERANTO**

Directora: María Aurora Viloria

Dirección y administración
Carreras Candi, 34 — 36
08028 BARCELONA

REDACTOR JEFE

Giordano Moya
Balmes, 38 Tel. (93) 7881839
TERRASSA (Barcelona)

COMITE DE REDACCION

Vicente Hernández Llusera
Gabriel Mora i Arana
Andrés Martín González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz
Antonio Marco Botella

ENHAVO

La kovrilo: Maldekstre, s-ro Juan García
Pintado, prezidanto de GRUPO KARTA-
GO—NOVA, Cartagena.

| | Pago |
|------------------------------------------|-------------|
| Vigo — Invito de la Prezidanto | 3 |
| Pensoj de Zamenhof | 5 |
| Esperanto-literaturo | 6 |
| La Du Princoj | 7 |
| Greke, Latine kaj Esperante | 8 |
| Raporto de HEF | 10 |
| Financa raporto de HEF | 12 |
| 10a HEJS-RENKONTIĜO | 16 |
| Programo de la 46a KONGRESO | 24 |

UTILAJ ADRESOJ

Hispana Esperanto-Federacio
Carreras Candi, 34-36
Tel. (831) 240 26 62
08028 BARCELONA

PREZIDANTO. Salvador Aragay

VICPREZIDANTO. Luis María Hernández

SEKRETARIO. Víctor Ruiz

VICSEKRETARIO. Josep Miranda

KASISTO. Joan Font

Pagojn sendu al
Caja de Pensiones para la Vejez y de
Ahorros. Libreta núm. 2.303-26
Agencia Riera Blanca, 436
08028 BARCELONA

JUNULARA SEKCIO (H.E.J.S.)
Atocha 98, 4º
28012 MADRID

FERVOJISTA SEKCIO (H.E.F.A.)
Ronda S. Antonio 46-50, 2º 4º
08001 BARCELONA

TURISMA SEKCIO KAJ ELDONA FAKO
kaj "FUNDACION ESPERANTO"
Inés Gastón
Pº de la Constitución 35, 4º
5001 ZARAGOZA

LIBRO—SERVO
Luis Hernández García
Apartado 119
47080 VALLADOLID
Pagojn por LIBRO—SERVO
Cuenta Postal 3.118.078 VALLADOLID

ĈEFDELEGITO DE U.E.A. EN HISPANUJO
Juan Azcuenaga Vierna
Gral. Dávila 127, portal 7, 2º izda.
Tel. (942) 33 94 87
Cuenta Postal 03548531
39007 SANTANDER

OFICEJO
Rodríguez San Pedro, 13, 3º P-7
28015 MADRID

INFORMA OFICEJO
(Vakas)



vigo

Hola samcelanoj! Post kelkaj semajnoj okazos en Vigo, Galegio, nia jara hispana kongreso, ĉi okaze la 46a, kaj dank'al la bona kaj efika laboro de la membroj de la L.K.K. prezidata de s-ro Julio Bueno, ĉiu el ni ĝuos kaj ŝatos eksterordinaran eventon kaj unikan Esperanto-etoson.

La kongresa programo, vere estas altira, enhavanta tri malsamajn erojn: kulturen, pacan, kaj turisman, ĉar ni bone konscias, ke la kongresanoj deziras labori kaj studi, sed ankaŭ ĝui la kulturon, la belaĵon kaj la spiriton de nia kongresurbo.

En nia movado tradicie kunvivis diversaj interpretoj pri la uzo de Esperanto, pri la interrilatoj de niaj Esperanto-organizo kaj la politikaj, religiaj kaj pacaj institucioj. Tiu ĉi jaro, ekzemple, 1986

estas deklarita de la Ĝenerala Asembleo de UN kiel LA INTERNA-CIA JARO DE LA PACO, kurioze ankaŭ la ĉeftemo de la 46a H.K. estas ESPERANTO KAJ LA PACO. Ĉu la esperantistaro sentas la bezonon de pli efika laboro por la paco? Ĉu finfine la esperantista sinteno krei UNU GRANDAN RONDON FAMILIAN, enpenetris en la koron de la registaroj?

Tiujn kaj aliajn demandojn, vi povos interparoli, diskuti kaj pensi profunde, ĉeestante la kongreson.

Kaj atentu, la L.K.K. nur havas 300 dokumentarojn kaj kajerojn por la kongresanoj, se vi estas la aliĝnumero 301-a vi certe ne ricevos la belegan teknon, disdonacitan de la Ŝpara Kaso de Vigo.

Tial do aliĝu, sekve, urĝe, tuj, tuj. Ĝis Vigo.

Salvador Aragay

POEZIA ANGULO

ĈE L' VENTO...

De kie, tiel dolĉa rozparfum' al mi venas
kies mutan mesaĝon mia koro komprenas?
Ĉu ĝi estas la flustro de la spirito via
fluganta tra la spaco en serĉo de la mia?
Ĉu eble estas via amsenespera sento
kiu al mi revenas kun, la printempa vento?
Ĉu romantika eĥo de l' "Rêverie" Schumann
kiu estis simbolo de sopireg' lontana?
Ĉu la muzik', al kiu via hor' apartenis
kaj —magia diino— vian vivon forprenis?
Ĉu la voc' de l' arbaro de via norda lando
kiu perdiĝas muta ĉe mia muta strando?
Ĉu la lasta deziro de feliĉo neebla,
ĉiam de vi revita, ĉiam neatingebla?
Ho, ve! Kio vi estu, rozparfumo mistera
por mi estas nur eĥo de voĉo senespera,
ombro de reva amo, de senfina doloro,
de nostalgi' eterna de via trista koro,
muta mesaĝo lasta, adiaŭo pardonema
de via buŝ' senmova, lastfoje ridetema...

José F. Arroyo

(en E-o originale)

DEZIRAS KORESPONDI

S-ino Teresa Nuravoska, oficistino, 02-934 WARSCAWA, ul. Spalska
5n 24 (Pollando).

55-jara instruistino. S-ino Rozalia Pyla, Tarmows Gorki, 42-600 ul
Cebriel 8/1 voj. KATOVICE (Pollando).

PENSOJ DE ZAMENHOF

09—24 1. al Moscheles, 18—2—1909 (rh; h—250)

Kara sinjoro!

Al la teksto de la rezolucio, kiun Vi sendis al mi, mi povas kompreneble esprimi nur mian plenan simpatian kaj konsentan. El mia tuta koro mi aligas mian voĉon al Via protesto kontraŭ ĉia reĝimo de la forto. Mi kredas profunde, ke baldaŭ venos la tempo, kiam la diversaj pecoj da tero ĉesos esti apartaĵo de tiu aŭ alia speciala nacio, religio aŭ politika partio, ke ili fariĝos apartenaĵo de ĉiuj siaj naturaj loĝantoj, kaj neniu plu havos la rajton akiri aŭ fordoni ian teritorion aŭ perforte altrudi al ĝiaj loĝantoj leĝojn kaj morojn, kiujn ili ne deziras. Mi kredas, ke baldaŭ venos la tempo, kiam la loĝantaro de ĉiu teritorio konsistos nur el homoj kaj civitanoj, sed ne el popoloj mastrantaj kaj popoloj mastrataj.

Via L. Zamenhof

(Paĝo 39, kajero 9, eldonejo ludovikito.)

05—137 ekstrakto el letero al Moch, 29—2—1905

Tre estimata sinjoro! Mi ricevis vian bonegan raporton al la Kongreso de Paco kaj ankaŭ la salutan leteron subskribitan de la esperantistoj-pacifistoj. Por ambaŭ volu akcepti mian plej koran dankon.

Mi esperas, ke via Raporto pli aŭ malpli frue donos tre bonajn fruktojn. Nun la pacifistoj ne volas ankoraŭ tre ligiĝi kun Esperanto, kaj la esperantistoj timas ankoraŭ tro oficiale aliĝi al la pacifistoj sed mi estas konvinkita, ke pli aŭ malpli frue la ideoj de la esperantismo kaj pacifismo tute kunfandiĝos, ĉar la fina celo de ambaŭ estas tia sama: interfratigi la homaron...

(Paĝo 188, kajero 7, eldonejo ludovikito.)

Al fraŭlinoj Peckover

18—7—1914

... Grandan servon Vi faris ankaŭ al la afero de paco per tio, ke Vi ebligis eldoni en Esperanto la verkon de Baronino Suttner ("For la batalilojn"). Pro ĉio volu akcepti mian koran dankon.

Kun alta estimo

L. Zamenhof

(Paĝo 411, kajero 9, eldonejo ludovikito.)

ESPERANTO – LITERATURO

LA DU PRINCOJ (Rakonto por infanoj)

Ekzistis en tempo tre antikva kaj tre tre malproksime de ni ĉiuj, iu malgranda regno apud la maro, kies reĝo havis du filojn.

La plej aĝa estis aroganta knabo, alta, forta kaj tre fiera. La dua filo de la reĝo estis modesta junulo, silentema kaj, laŭ ĝenerala opinio en la Kortego, ne tiel lerta kiel sia frato.

Iun tagon, dum la reĝo sidis en sia trono, la plej aĝa filo parolis tiel al sia patro:

—Patro, via regno estas tre malgranda, kaj niaj najbaroj ne sufiĉe respektas nin. Niaj regnanoj estas humilaj kamparanoj kaj fiŝistoj. Ili ne produktas abundan riĉaĵon kaj la grandeco de via regno ne elstaras super tiu de la aliaj regnoj. Do, la digno kaj gloro de via krono postulas, ke ni ampleksigu niajn limojn kaj plifortigu nian popolon. Mi multe pensis pri tio kaj venis al la konkludo, ke por grandigi niajn terojn kaj fortigi la regnon ni devas konkeri aliajn pli riĉajn landojn. Do, mi petas al vi, kara patro kaj respektata reĝo, ke vi donu al mi cent el viaj plej fortaj kaj bravaj junuloj por formi bone ekipitan armeon, kaj pere de ĝi, mi konkeros la landon sude de la nia kaj akiros tiamaniere riĉecon kaj glo-

ron por via nomo kaj por la tuta regno.

La reĝo karesis sian blankan barbon kaj post profunda pripensado respondis:

—Kara filo, granda estas via amo al la patrujo, kaj mi dankas la Ĉielon, ĉar vi ne timas riski vian vivon pro la grandeco de la regno kaj la digno de mia krono. Mi akceptas vian saĝan proponon kaj nomas vin generalo de la formota armeo. Elektu la plej fortajn kaj bravajn el niaj junuloj kaj iru lukti kontraŭ la suda regno, kies reĝo neniam montris specialan simpatian al mia reĝa persono.

Tiel, la princo elektis cent junulojn, trajnis ilin bone, disdonis belajn uniformojn, flagojn kaj armilojn, kaj iun matenon je la sono de trumpetoj kaj tamburoj, la reĝa armeo ekiris suden por pligrandigi la landon kaj konkeri gloron kaj grandecon por la regno.

Tagojn poste, la dua filo de la reĝo venis al la patro, kiam tiu ĉi vekigis post la reĝa siesto, kaj respekteme parolis tiel:

—Mia kara patro kaj sinjoro, mi estas malgaja de kiam mi ne plu devas suferi la tiklojn kaj ŝercojn de mia kara frato, la heredonta princo. En tiaj kondiĉoj, estas malfacile por mi resti en la Kortego, kaj tial mi petas vian reĝan permeson por iri al la altaj montoj en la

nordo de nia lando kaj tien konduki cent ŝafinojn kaj unu fortan ŝafon, kiu portos ĉirkaŭ la kolo sonorilon, por eviti ke la inoj perdiĝu inter la arbecaj valoj kaj montoj de la regiono.

Jen, atenta leganto, la respondo de la reĝo:

—Filo, tia ne estas malbona ideo. Prenu viajn bestojn, iru al la nordaj montoj, paŝtu dum la somero kaj la aŭtuno, kaj revenu hejmen kiam ajn vi deziros.

Tre kontente, la juna princo kunigis cent ŝafinojn kaj unu fortan virŝafon kun belsona sonorilo, kaj ĉe la sekvanta sunleviĝo li ekiris kun sia ŝafaro direkte al la nordaj montoj de la lando.

Pasis la somero, pasis la aŭtuno kaj venis la unuaj malvarmoj de la vintro. Promenante sur la plej alta teraso de sia palaco, la reĝo ĉiam rigardadis suden. Iun tagon, tre malproksime, li ekvidis rajdanton kiu venis rapide, portantan ion brilan en la dekstra mano. La reĝo descendis al la pordo de la palaco, kaj tie renkontiĝis kun la plej aĝa filo; kiu portis sangan glavon en la mano.

—Mia kara filo!

—Patro kaj sinjoro, jen mi estas finfine. Mi povis savi mian vivon, sed bedaŭrinde miaj cent soldatoj mortis brave luktante kontraŭ superaj fortoj. La malamikoj estis ducent kaj kaŝe nin atendis en malnobla embusko. Mia patro, bezonas ke vi fandigu cent bronzaĵajn

medalojn kiel premion kaj konsolon, por ilin disdoni inter la karaj patrinoj de niaj gloraj mortintoj.

—Tiel oni faros, mia amata filo—, respondis la reĝo.

Kelkajn tagojn poste, dum la reĝo.

Kelkajn tagojn poste, dum la reĝo promenadis tra sia ĝardeno, li hazarde rigardis norden kaj vidis grandan pulvoran nubon alproksimiĝantan al la urbo. Sonorilo gaje tintis meze de la nubo.

Unu horon poste aperis en la ĝardeno la juna princo, kun avelujstango en la mano, kaj kovrita de ŝvito, pulvoro kaj ŝafodoro.

—Mia patro kaj reĝo, —diris li— mi revenas hejmen kaj mi estas feliĉa diri al vi, ke niaj cent ŝafinoj jam estas enfermitaj en sia ejo, pli dikaj, grandaj kaj belaj ol kiam ni foriris.

—Bone, bone, filo —respondis la reĝo—. Iru rapide vin bani, ĉar ne estas facile elporti la odoron de viaj cent ŝafinoj, kiun vi portas sur vi.

—Tiuodoro, kara patro, venas ne nur de niaj cent ŝafinoj, sed ankaŭ de la cent ŝafidetoj, kiujn ili naskis en la nordaj montoj.

—Dankon, mia filo. Iru vin bani.

Kaj la princo iris sin bani.

Kiam la saĝa kaj nobla reĝo mortis, ambaŭ princoj multe ploris. La plej aĝa filo fariĝis reĝo kaj generalo de la armeo. La juna princo estis nomata Honora Paŝtisto de la regno.

JES

GREKE, LATINE KAJ ESPERANTE

Kiam oni parolas pri la deveno de Internacia Lingvo, estas kutime rimarki, inter la francaj, anglaj kaj germanaj radikoj, la latinajn. Estas evidente, ke temas pri tio, kio plej frapas la supraĵan atenton de komencanto. Tamen, ĉar la afero ne finiĝas per simpla rigardo en la vortaron, necesas profundigi niajn konojn serĉante pliajn similaĵojn en la latina, la greka kaj esperanta lingvoj.

Tradicie, oni konsideris Morfologion kiel unu el Partoj de la Gramatiko. Nu, ĝuste unu el la temoj apartenantaj al ĉi tiu parto konsistas el la deklino, t.e. (laŭ Plena Vortaro de Esperanto), "aro de la modifoj kiujn en kelkaj lingvoj ricevas substantivo, pronomo aŭ adjektivo aŭ ĝia sekvo (genro), nombro kaj gramatika rolo." Neatentante, ĉifoje, gramatikajn nuancojn de la germana lingvo, mi rimarkigos nur la rilatajn al la latina kaj greka lingvoj kompare kun Esperanto.

Deklinacio

—Latina—

Havas tiujn ĉi kazojn: Nominativo, genitivo, dativo, akuzativo, vokativo kaj ablativo. Ĉiam oni atingas deklinacii latinon per fleksio, t.e. per modifoj de la vorto.

—Greka—

Havas tiujn ĉi kazojn: Nominativo, genitivo, dativo, akuzativo kaj vokativo. La artikolo ne havas vokativon. Oni deklinacias ankaŭ per fleksio.

—Esperanta—

Havas du kazojn fleksiajn: Nominativo kaj akuzativo. Rilate la ceterajn oni agadas samkiel en kastilia lingvo, t.e. per la koncerna prepozicio plus la vorto nominativa.

El tio ĉi oni povas konkludi, ke Esperanto kaj la du aliaj lingvoj similas inter si, ĉar ili havas fleksian deklinacion almenaŭ koncerne nominativon kaj genitivon. Tamen, ne aperas tia kongruenco rilate al la finaĵo de l'akuzativo ĉar, kvankam greke, multfoje, ĝi finiĝas en singularo per "V" (nia "n"), kaj tiel ĝi koincidas kun la esperanta akuzativo, en pluralo neniam la esperanta estas egala je la latina kaj la greka.

Uzo de la nominativo kaj de la akuzativo

Ni eniras en la sintaksan spacon. Kiam oni ĝuste uzas la nominativon? Ĉifoje, la respondo estas tute sama por la tri lingvoj. Ĉiam la subjekto de la ĉefpropozicio devas esti en nominativo, kaj la samon oni povas diri rilate al

la subjekto de propozicioj ne subordigitaj nek kunordigitaj. Ankaŭ la nominativo estas la kazo de la neverba predikato kaj de la predikativo.

Pri la rilatpronomo kaj la reprezentata nomo (aŭ pronomo) ni povas aserti preskaŭ la samon rilate la tri lingvojn (escepte pri la genroj, kompreneble, ĉar ĉi tiu gramatika formo ne ekzistas en Esperanto). La rilatpronomo akordas kun la reprezentanto nombre, kaj kun sia verbo funkcie, t.e. nominative se subjekto, akuzative se temas pri rekta objekto.

Ĉiam la rekta komplemento estas akuzativo en la tri lingvoj.

Finfine, ankoraŭ pri la akuzativa afero ni rajtas diri, ke samkiel okazas en Esperanto, kiam la subjekto de iu subpropozicio troviĝas akuzative, ĉar la koncerna verbo prezentas la infinitivan formon, ankaŭ en latina kaj greka lingvoj oni metas akuzative la subjekton de la responda verbo infinitive uzata. Aliokaze, la menciita subjekto aperas nominative kaj tion ni povas konstati tre facile.

Memkompreneble, la spaco de iu ajn artikolo ne ebligas klarigi tute gramatikan temon tiel kompleksan. Tamen, kaj malgraŭ tio, mi esperas, ke leginte ĝin, iuj samideanoj ne fakuloj pri latina kaj/ aŭ greka lingvoj, konos, iomete pli, la gramatikajn interrilatojn de la tri lingvoj.

—NOTO DE LA AŬTORO. Ĉiuj aludoj al greka lingvo aperintaj ĉi tie, akordas kun la klasika lingvo de la grekoj, sed neniam kun la dialektoj aŭ la moderna, devige.

Andrés Martín



NIAJ GRUPOJ

MURCIA

Oni festis la Zamenhof-tagon, okaze de la inaŭguro de Strato Esperanto, (Calle del Idioma Esperanto) en la urbo "Los Alcázares". Tiu inaŭguro ne povis okazi dum la Kongreso de Cartagena.

La inaŭgura akto estis prezidata de la Kultura Konsilanto kaj la Sakretario de la Urbeŝtaro de Los Alcázares kaj de la s-roj Francisco Zaragoza, Juan García Pintado kaj Manuel López Serna reprezentante la Esperantistan Movadon.

RAPORTO DE HISPANA ESPERANTO—FEDERACIO

Periodo de la 1a de Julio 1985 ĝis la 30a de junio 1986.

Tradicie ene de la Hispana Kongreso okaze de la ĜENERALA KUNVENO oni interparolas, komentarias kaj voĉdonas pri la farita laboro de la estraranoj kaj respondeculoj de HEF. Por faciligi vian studadon, ni prezentas al vi nun la raporton, kiu skize resumas la agadon ekde la pasinta kongreso en Kartageno.

"BOLETIN". La oficiala organo de nia Federacio, estas presata ekde la numero 271a en "Gràfiques el Tinell" en Barcelono. Nova kovrilpaĝo kaj novaj literformatoj certe atentigos vin, sed esence ĝia enhavo restas sama kiel antaŭe. Du eroj de la bulteno estas novaj "PENSOJ DE ZAMENHOF" kaj "DOKUMENTOJ", cele, ke ĉiu membro posedu la idearon de L.L. Zamenhof kaj seriozan materialon pri la diversaj sintenoj pri nia internacia lingvo de publikaj institucioj kaj aŭtoritatuloj.

ALIGINTAJ ASOCIOJ. Iom post iom, novaj E-grupoj fondiĝas kaj kelkaj el ili oficialiĝas. Preskaŭ ĉiuj aliĝas al HEF, entute estas 45 E-grupoj, kaj tiu sinteno fortigas nian Federacion, ĉar ni jam superis la nombron de 900 asociaj membroj, vera rekordo en nia landa movado.

KONGRESOJ. En la periodo de tiu ĉi raporto okazis en Hispanio la jenaj eventoj: 45a Hispana Kongreso en Kartageno, 3a Andaluzia Kongreso en Sevilla, 1a Astura Kongreso en Naiva, la 21a Kataluna Kongreso en San Cugat del Vallès, 13a Valencia Renkontiĝo, 10a HEJS Renkontiĝo en Barbastro kaj multaj aliaj kunvenoj kaj renkontiĝoj okaze de tradiciaj festoj aŭ inaŭguroj, kiel la renkontiĝo en "Los Alcazares" (Kartageno) okaze de la inaŭguro de straro "Idioma Esperanto".

UNIVERSALA KONGRESO. Hispana delegitaro ĉeestis la 70an Universalan Kongreson en Aŭgsburbo (Germanio) kaj jam planis la partoprenadon en la U.K., en Pekino kaj Varsovio.

JUNULARA SEKCIO, HEJS. Regule eldonis sian organon HEJS—Juneco kaj gejunuloj partoprenis tre aktive en la diversaj kongresoj kaj renkontiĝoj, speciale en Kartageno kaj en Sant Cugat del Vallès.

Tre sukcese ĝi organizis la 10an HEJS—Renkontiĝon en Barbastro kaj kiel landa sekcio de TEJO informis per sia bulteno pri la eksterlandaj kaj internaciaj junularaj kongresoj kaj aranĝoj.

FERVOJISTA SEKCIO, HEFA. Regule eldonas sian bultenon LIBERA TRAKO, organizas Esperanto-kursojn en sia sidejo en la Stacio SANTS—Barcelono kaj multnombra delegitaro ĉeestis la internacian IFEF—Kongreson.

TURISMA SEKCIO. Organizis la Francaj-Hispanajn renkontiĝojn kaj nun kunordigas la jaran renkontiĝon en PAU, Francio.

LIBROSERVO. Daŭrigis sian komercan agadon kaj fruktodonan helpon en la disvendado de E-verkoj kaj E-gramatikoj. Regule oni eldonas listo-katalogon kiu permesas koni la lastajn E-verkojn, eldonitajn kaj la realan eblecon de la aĉetontoj.

ELDONA FAKO. Dum la lasta jaro, nenio estis eldonita sed por la nuna jaro oni jam preparas diversajn projektojn, kiuj estos prezentataj en Vigo.

INFORMA FAKO. (Informa Oficejo). Tiu ĉi departamento ne funkciis en la lasta jaro, pro tio nenion ni povas raporti. Tamen ni deziras atentigi vin ke la HEF-estraro serĉas kunlaboranton por tiu ĉi Informa Oficejo, ĉar ni konsideras ke la informado al la ne esperantistoj estas tasko nepre farennda kaj urĝa.

OFICEJO EN MADRIDO. Daŭrigas sian agadon instruante Esperanton kaj pretigante arkivon de la Federacio. Plie ne regule okazis en la oficejo konferencoj kaj kunvenoj.

SIDEJO EN BARCELONO. La estraranoj de la HEF—Sidejo en Barcelono, klopodis agi efike pri la administrado, eldonado de la bulteno kaj kunordigado de la diversaj sekcioj kaj fakoj de nia Federacio. Ankaŭ kunlaboris regule kun aliaj Esperanto-organizoj ekzemple; Hispana Jubilea Komisiono, Fundación Esperanto, Hispana Sekcio de ILEI, Universala Esperanto-Asocio, TEJO, SAT, ktp. Pro tio ni petas vian indulgon se eniu ajn momento ni ne plenumis adekvate viajn petojn kaj sugestojn. Kiel ĉiam ni restas je via dispono.

La Prezidanto
Salvador Aragay

La Sekretario
V́ctor Ruiz

KUNVOKILO DE LA ĜENERALA KUNVENO DE LA HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Laŭ la artikolo 25a de nia statuto oni kunvokas la Ĝeneralan Kunvenon de HEF ene de la 46a Hispana Kongreso en Vigo, je la tago 19an je la 5a horo vespere en la salono de la kongresejo "Centro Cultural de la Caja de Ahorros de Vigo, strato Policarpo, 13.

TAGORDO

1. Legado kaj aprobo de la akto de la antaŭa ĝenerala kunveno.
2. Legado kaj aprobo de la sekretaria raporto.
3. Legado kaj aprobo de la financa raporto.
4. Legado kaj aprobo de la agadplano por la Jubilea Jaro 1987.
5. Propono pri altigo de la HEF-kotizoj.
6. Proponoj pri urboj por la estontaj kongresoj.
7. Demandoj, Sugestoj kaj Proponoj.

La Sekretario
V́ctor Ruiz

FINANCA RAPORTO DE HEF—1985

Malgraŭ la konstantaj zorgoj en la HEF-sidejo de Barcelono, ni devis re-zigni la realigon de kelkaj agadoj. Ni konstatis ke malgraŭ la organizado de la Nacia Lotado, niaj elspezoj kaj enspezoj estas tre similaj. Jen estas la ciferoj:

ELSPEZOJ

| | | |
|-------------------------------------------------------------------|---------|--------|
| Pago de 5 eldonoj de Boletín | 489.231 | p-toj. |
| Luado sidejo, telefono, ktp. | 70.000 | " |
| Korespondado, rembursoj, presaĵoj | 152.306 | " |
| Asociaj kotizoj al Universala E-Asocio kiel landa sekcio | 28.984 | " |
| HEJS — subvencio | 15.000 | " |
| | <hr/> | |
| Entute | 755.521 | p-toj. |

ENSPEZOJ

| | | |
|----------------------------------|---------|--------|
| Favora saldo de 1984 | 22.906 | p-toj. |
| Kotizoj | 613.251 | " |
| Donacoj | 50.605 | " |
| Subvencio de la Ŝpara Kaso | 25.000 | " |
| Gajno de la libroservo | 49.000 | " |
| | <hr/> | |
| Entute | 760.762 | p-toj. |

FAVORA SALDO 5.241 ptoj.

Barcelono 31a de Decembro de 1985

Kasisto

Joan Font

NIAJ GRUPOJ

GIRONA

ĜIRONA ESPERO organizis la pasintan 12an de aprilo, omaĝon al samideano veterano Martí Aguado. Menciindas la gravan taskon kiun s-ro Martí Aguado plenumis en Girona, eĉ li prezidis en Ĝirona Espero dum tri jaroj.

VALENCIO

La pasintan 25an de majo (1985), estis koncesiita al samideano José Fernando Soler Sempere, la Ora Medaĵo 1985 de la oficiala Kolegio de Teknikaj Arkitektoj, kiel kolega rekono pro lia honora profesia laboro.

4-a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

GRANADO, 15a – 17a Aŭgusto 1986
CENTRA TEMO: A.E.U. ANTAŬ LA CENTJARIĜO DE ESPERANTO

PROVIZORA PROGRAMO

VENDREDON 15–8–86

- 10.00 = Akceptado, kaj disdonado de dokumentoj. Oficiala Malfermo. Ĝenerala kunveno de A.E.U. Kursoj de Esperanto.
17.00 = Kunsido de la estraro de AEU kun laborgrupoj. Kursoj de Esperanto. Projekcio de Esperanta Filmo.

SABATON 16–8–86

- 10.00 = Kunveno pri la Centra Temo. (prezentado de agadproponoj por la Jubilea Jaro). Prezentiĝo kaj elekto de la Jubilea Komisiono). Kursoj de Esperanto. Projekcio de lumbildoj pri Esperantaj Renkontiĝoj.
17.00 = Hispanlingva prelego pri la Historio de Granado. Kursoj de Esperanto. Teatraĵoj en Esperanto.


DIMANĈON 17–8–86

- 10.00 = Kursoj de Esperanto. Ĝenerala Kunveno pri "Esperanto en Andaluzio". Ekzamenoj pri elementa kaj meza kursoj. Projekcio de Filmo.
13.15 = Fermo de la Kongreso (Salutvortoj de la LKK kaj AEU-Prezidantoj, disdonado de Diplomoj kaj kantado de la Himnoj).
14.00 = Komuna Tagmanĝo en la kvartalo Albaicín.
17.00 = Vizito al la Urbo kaj Adiaŭoj.

VIZITINDA EKSPozICIO PRI LIBROJ, REVUOJ. BROŝUROJ, ESPERANTAĴOJ, KTP.

ATENTON. LIBROSERVO DE HEF FERIAS dum la monatoj julio kaj aŭgusto. Bonvolu ne fari mendon ĝis la 1a de septembro. Antaŭdankon.

NEKROLOGO



La 1-an de majo, subite mortis 72-jara en Sabadell, kie li naskiĝis, la esperantista veterano s-ro Luiso Mimó Espinalt, aŭtoro de tri Esperanto-lernolibroj kaj verkinto de valoraj artikoloj prilingvaj. Ekzemple, lia studo pri la kunmetitaj kaj kunderivitaj vortoj, kiu troviĝas en lia verko "Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto", liveras al la leganto tre objektivan klarigon, kontraste kun la komplika teorio tiu-tema, prezentita de aliaj Esperanto-gramatikistoj.

Kun senbalasta stilo, baziĝanta sur la logiko, li tradukis en Espe-

ranton la literaturajn verkojn: "Tamen civilizitaj", "Neĝobulo", ambaŭ de Carles Soldevila, kaj "Don Juan Tenorio", de José Zorrilla. Li krome lasis prespretaj la tradukojn: "Kataluna Don Kiŝoto", de Santiago Rusiñol, kaj "Donna Perfekta", de Benito Pérez Galdós, kiuj romanoj estas jam deponitaj en la "Literatura Fako" de HEF por eventuala eldonado, okaze de la Centjareco de Esperanto. Bedaŭrinde la morto lin surprizis ĉe la redaktado de kompleta vortaro en Esperanto, kiun li havis preskaŭ finita.

S-ro Luiso Mimó Espinalt ekesperantistiĝis en 1931, kaj dum pluraj jaroj li gvidis Esperanto-kursojn en Sabadell, antaŭ kaj post la inter-civitana milito.

Al liaj esperantista edzino, gefiloj, nepino kaj cetera familio, nian plej sinceran kondolencon.

V. H.

JUBILEA JARO

HISPANA MINISTERIO ELDONAS AFIŜON EN ESPERANTO

Laŭ peto de la hispana komitato por la 47a Hispana Kongreso de Esperanto en Madrido, dum Pasko 1987, la Ministerio de Transportado, Komunikado kaj Turismo, en februaro eldonis grandan kolorafiŝon pri la 47a Kongreso kaj la Jubilea Jaro.

La bildo prezentas detalon de la plej fama pentraĵo de Velazquez, nomata "Las meninas".

Temas supozeble pri la unua turisma afiŝo eldonita en la mondo okaze de la JUBILEA JARO.

Bonvolu peti ekzempleron, rekte al 47a de H.K. de E., strato Atocha 98, 4, 28012 Madrid.

NOVAJ MEMBROJ. Josep María Castañ, Joaquin Campuzano, Pere Navarro, Celestin Mesa, Angel Arroyo, María Diego, Rafael Blanco, Juan Carlos Nuño, José González, Crescensio Vicario kaj Nicolás Múñiz.

71a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO – PEKINO, ĈINIO. La hispana delegitaro kiu ĉeestis la UK-on, estos prezidata de s-ro Juan Azcué-gana Vierna, nur li rajtas reprezenti Hispanan Esperanto-Federacion kaj decidu pri iuj ajn temoj kaj subskribi dokumentojn nome de HEF, en la UK de Pekino.

DUMVIVAJ MEMBROJ. Kiel jam estis anoncote, en Vigo oni proponas novajn kotizojn, tio signifas ke la nuna kotizo DM, ŝanĝiĝos.

Ni alvokas vin, leganto, al tio ke, se vi deziras profiti la nunan kotizon por Dumviva Membreco al HEF, ĝi estas nur 20.000 pesetoj.

Certe vi ŝparos monon kaj plie, vi finance helpos la okazadon de la JUBILEA JARO. Profitu la nunan okazon kaj membriĝu kiel DM de HEF.

NUNAJ DUMVIVAJ MEMBROJ DE HEF: Gerardo Flores, José María González, María Angeles Estruch, Angel Figuerola, Tomás Ortiz, Manuel Casanovas, Josefina Girona, Salvador Aragay, Fermín de Urmeneta, Faustina Martínez, Luis Hernández, Sergio Docal, Manuel Manteca, Marcelina Palomo, Manjo Garcés, Miguel Sancho, Antonia García, Hertor Luciano, Antonia Urgelles, Fernando de la Torre, Pedro González, Pepita Gallart, José Ramón López, María García, Armando Cortés, Joaquín Bielsa, Ben Parkinson, kaj Francisco Azorín.

REMBURSOJ. Pasiĝare oni sendis al HEF bultenon de julio-aŭgusto, remburse al la membroj kiuj ankoraŭ ne sendis sian monsumon por la jara kotizo. Pro la kostoj de la poŝtoŝejo oni devas altigi la rembursojn po 20 procentoj: plie la organizado de centoj da rembursoj, postulas de ni multajn laborhorojn, kiujn ni dezirus dediĉi por aliaj aferoj. Tiel do la HEF-estraro, restos tre dankema al ĉiu membro, (kiu ankoraŭ ne pagis sian kotizon) se li pagos sian kotizon en la 46a Kongreso de Vigo. Antaŭdankon.

JUBILEA JARO. Ĉu via Loka Grupo, Sekcio, Klubo aŭ Asocio jam planis sian agadon por la Jubilea Jaro? Ĉu ĉeestis reprezentantoj de via organizo en VIGO? Kiom da kongresoj, renkontiĝoj, seminarioj, kunvenoj la esperantistaro devus organizi en 1987? Tiuj kaj aliaj demandoj staras antaŭ ni. Venu al Vigo kaj kune ni planos nian laboron.

**Sekretario
Víctor Ruiz**

SKIZA RAPORTO PRI LA ĴUSA 10a HEJS-REKONTIĜO

Nordoriente de Zaragoza en la provinco de Huesca situas Barbastro, urbo, kiu malfermiĝis de la 28a ĝis la 30a de marto por akcepti la ĉi-jaran HEJS-Renkontiĝon. En ĝia organizado elstaris J.E.S.A. (Junulara Esperantista Societo Aragona), kies viglaj membroj tre brave montris, ke ilia organizo naskiĝis sub bona lumo.

Tiuj preskaŭ kvindek personoj ĉeestantaj la renkontiĝon povis ĝui tre kompletan programon, kiun pretigis HEJS, sed krome kaj eksterprograme montriĝis kiel kutime tre interesa la kontakto kun novaj esperantistoj kaj la diskutoj kaj opiniinterŝanĝoj spontanee naskiĝantaj.

La renkontiĝo komenciĝis la sanktan vendredon 28an je la 11a, kiam oni oficiale ovrís ĝin en tre etosa kunveno. Krom prezenti la programon, oni dankis la organizantojn, ĉar ni disponis tre taŭgan restadejon, kie kontraŭ malmulte da mono ni rajtis tranokti kaj trifoje manĝi en la tago. Sekve ni vizitis la Urbodomon kaj tie la urbestro mem akceptis nin. Vespere okazis la faka kunveno de "Junaj Verkistoj" (kie oni ĉefe parolis pri la enhavo de PANDEMONIO, libro kiun tiu asocio eldonos danke al subvencio de Andaluzia Espe-

ranto-Unuiĝo) kaj la Ordinara Kunveno de HEJS. Pri ties ĝusta enhavo vi povos pli komplete legi en HEJS-JUNECO. Mi tamen povas skizi tion, kio tie okazis: 1) Oni komunikas, ke ĉiuj HEJS-anoj ne paralele UEA-anoj jam ricevas ankaŭ la revuon KONTAKTO. 2) Ni konsentis ne plu aboni la gazeton KONCIZE. 3) Rapidigi la federaciĝon de la junularaj regionaj organizoj kaj restarigi la delegitan reton tie, kie ne ekzistas regiona organizo. 4) Informo pri la demisio de la kasisto. Ĝis la sinprezento de nova kasisto la Komitato zorgos pri la monadministrado. 5) Okazigo de la venonta HEJS-Renkontiĝo en Madrido paralele kun la Jubilea Kongreso, aŭ, se tien oni ne povas realigi, okazigi ĝin en Monistrol, Katalunio, kie troviĝas volontaj organizantoj. 6) Ĉar ne ĉeestis iu KEA-reprezentanto, oni ne povis kontrasti la diversajn opinioj, kaj pro tio la Komitato plustudas la aferon kaj provos kontakti KEJ por solvi la problemon. Je la komenco de la Kunveno oni legis la jarraporton de HEJS kaj je la fino, la prezidanto de HEJ, Salvador Aragay, kiu ĉeestis de la komenco, prezentis la novajn eldonojn de Barcelona E-Centro, kiun ni ree devas danki pro la poraŭkcia dona-

co favore de HEJS de pluraj libroj.

Sabate matene ni bonŝancis havi kun ni nian karan Akademianon Fernando de Diego, kiu publike prelegis en urbosalono pri Esperanto kaj Junularo. Tiun prelegon sekvis debato inter li kaj kelkaj ĉeestantoj. Mi profitu tiun okazon por lin redanki meme de HEJS pro lia sindonemo partopreni kaj riĉigi nian Renkontiĝon. Vespere okazis la faka kunveno de KAPE (Komputer-Amantoj Por Esperanto), kie oni parolis pri ties partopreno en KOMPRO, internacia komputika organizo, pri la eldono de "Se... Do...", revuo de KAPE, kaj pri la plej tujaj projektoj de tiu asocio,

ĉefe pretigo de programoj lernigantaj Esperanton. Ankaŭ fake sed senrilate al HEJS, pluraj "SAT-ĵurnalkavanoj" kunvenis por prepari sian venontan Internacian Renkontiĝon en Ejea (Zaragoza).

Mi eble forgesas ion el la tuta programo. Memoru tamen, ke ankaŭ eksterprograme nia renkontiĝo brilis: estus malfacile forgesi niajn viglajn konversojn en esperanto, nian dancadon ritme de kelta muziko en la distra vespero, niajn promenadojn kaj diboĉojn tra la urbo, ktp. Multon certe ni memoras pri Barbastro, kaj tie igos nin reiri al la venonta HEJS-Renkontiĝon iam ie.

Alberto Franco

NOVAĴOJ

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri lingvo Internacia = CDELI (Aŭspiciita de Svisa Nacia Komisiono por UNESKO) Biblioteko de la Urbo, strato Progrès 33, Poŝfako 5038 CH-2300 LA CHAUX-DE-FONDS 5, Svislando. CDELI estas verŝajne la plej taŭge ekipita interlingvistika centro por eldoni la tiom atendatan verkon "Bibliografio de Esperanto kaj Interlingvistiko". Ĝi aperos ĉiujane en kajeroj. Por ke tiuj kajeroj estu bibliografie kompletaj, gravegas, ke CDELI ricevu aktivan apogon de la libro- kaj revuo-eldonistoj, de la esperanto-organizaĵoj kaj de la interlingvistikaj medioj, de la ĵurnalistaro, de la sciencistoj, de la produktantoj de kasedoj kaj diskoj, de la organizantoj de kongresoj, kolokvoj, renkontiĝoj kaj kursoj, de la klub- kaj grup-gvidantoj, ktp. Estu sendata al CDELI por registriĝo specimena ekzemplero de ĉio aperinta en kaj pri Esperanto.

MURCIA

La "Consejo Municipal de Cultura del Excmo Ayuntamiento de Murcia", eldonis belan informilon pri la internacia lingvo Esperanto

PRI JUBILEOJ KAJ JUBILEANTOJ

Ĉu utilas jubileoj, solenaj aranĝoj, festaj kunvenoj kaj gloraj manifesta-
cioj?

Kiam mi estis pli juna mi certe estus respondita per klara neo. Kaj certe same respondas nun ĉiuj aktivaj esperantistoj por kiuj la 20a vivo-jaro estas io alproksimiĝanta aŭ ĵus malproksimiĝanta.

Nun mi pli hezitus respondi. Verŝajne la proverbaro ne estas tute ĝusta. Ĝi asertas ke kun la aĝo venas saĝo, sed mi konstatas ke kun la aĝo venas duboj.

Evidente multfoje jubileoj fariĝas okazo por malplena sinlaŭdado, kaj pri babilado pri tio, kio estus povinta okazi se...

Sed ne ŝajnas al mi ke tiel la Esperanto-movado komprenis la sencon de la nun alvenanta 100-jara jubileo de Esperanto. Se oni sekvis tra la internacilingva gazetaro la iniciatojn entreprenitajn sub la ŝildo "jubileo", oni certe rimarkis ke temas pri tre konkretaj agoj, kiuj pretekste de la festo volas esti momentoj de disvastigo de la lingvo.

Kiel, se ne tiel, oni komprenu, ekzemple, la kontaktojn kun la hispana re-
ĝo?

Kun granda plezuro mi konstatas ke okaze de la jubileo la hispana esperantistaro montriĝis unu el la plej aktivaj kaj organiz-kapablaj preter ĉiuj sablonoj pri la mediteraneanoj.

Mi ne detalos la konkretajn faktojn, kiujn la legantoj konas pli bone ol mi, sed mi simple bondeziras al la hispanaj esperantistoj por ke ili baldaŭ rikoltu la fruktojn de sia ĉirkaŭ-jubilea agado.

Renato Corsetti
Estrarano de U.E.A.

ESPASA CALPE S. A. ofertas enciklopediojn ESPASA, el 105 volumenoj kun tradukoj el la hispana en la francan, anglan, germanan, italan, Esperanton kaj katalunan. Informoj Tel. (93) 338.8683 kaj 664.0669 de Barcelono.

La estraro de A.E.U. kunvenis en decembro en la urboj Málaga kaj Granada. Ili pretigis la "Provizoran Programon" de la 4a Andaluza Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Granada dum la tagoj 15, 16 kaj 17 de aŭgusto.

Ili aprobis kunlabori kun la Hispana Esperanto-Federacio kaj la Komisiono de la Jubilea Jaro en la programoj por memorigi la centjarecon de Esperanto.

ĴAŬDAJ PAROLHOROJ EN SEVILJO

De la pasinta oktobro en la sidejo de la sevilja grupo okazas la tiel nomataj "Ĵaŭdaj Parolhoroj" laŭ la sama formo kaj celo de la "Artaj kaj Sciencaj Horoj" aranĝitaj en la naciaj kongresoj.

Tiel, ĉiusemajne unu kapabla samideano pretigas duonhoran prelegon pri iu ajn interesa temo, kiun li prezentas la ĵaŭdon vespere. Poste okazas debato aŭ demandado de la aŭskultantoj, per kiu ni praktikas la lingvon kaj plivastigas nian vortoprovizion pri diversaj temoj kaj fakoj, dank' al la laboro de la prelegantoj.

Sendube ĉi tiu estas la plej agrabla maniero vigliĝi esperante kaj ne stagni en la eble tro facilaj agadoj legi revuojn kaj paroli pri balaĵoj dum la renkontiĝoj.

Nu, okazis ĝis nun jenaj prelegadoj:

- La 10an de oktobro Alberto Franco parolis pri "La volitivo en Esperanto": interesega prelego pri la ĝusta uzo de la esperantaj verbomodoj kaj la kutimaj eraroj de la kastilparolantoj.
- La 17an Francisco A. Antúnez klarigis iom pri "Meĥanika Fiziko"; sed fakte pro la vasteco kaj komplikeco de tiu temo kaj la mallongeco de la prelego, ĉi tiu temis nur pri "Statiko", grava parto de la Meĥanika Fiziko.

- La 24an Luís Gilpérez aranĝis "Radioamatorado I"-n, en kiu li alproksimigis al ni la bazajn kaj ĉefajn radioamatorajn aferojn, lasante por venonta prelego la rilaton de Esperanto kun Radioamatorado.
- La 31an Antonio Rodríguez preligis la temon "Recenzo de la libro **La glacikovrita ponto**, de Ljuben Stanev. La preleganto rimarkigis la ĉefajn kuriozajn esprimojn kaj frazturnojn, kiujn uzis la tradukinto, kaj kiuj povas taŭgi por nia ĉiutaga praktiko de la lingvo.
- La 7an de novembro reaperis Alberto Franco kun jena prelego "Kiel ni diras. Alproksimiĝo al la Fonetikscienco I", per kiu li ekmalkovras al ni kaŝitan manieron vidi kaj studi lingvon.
- La 14an Francisco A. Antúnez gvidis klaseton pri "Algebro de Bool I". Tiel li sciigis nin pri la matematika bazo de la digita elektroniko, kiu nun aplikigas interalie al la komputilkampo kie ni kvazaŭdronas.
- La 21an daŭrigis Luís Gilpérez sian interesan paroladon pri Radioamatorado (ĉi-foje kun la titolo "Radioamatorado II"), per kiu li klarigis al ni, kiel profitas Esperanton la radioamatoroj kaj kiel nia lingvo taŭgas por ili.
- La 28an Antonio Rodríguez vi-

ce pritraktis la temon "Naturaj katastrofoj", kiu nun dolorige aktualas pro la ĵusaj gravaj kataklismoj en Meksikio kaj Kolombio.

— La 5an de decembro ekagis nia amiko Manolo López per la prelego "Iom pri Lingvoinstruado". Post klariga skizo pri ĝenerala intruado li analizis de la fa-

ka vidpunkto la du metodojn, per kiuj oni lernigas lingvon: la rektan kaj la tradician aŭ gramatikan.

Tiel daŭros niaj Ĵaŭdaj Parolhoroj, pri kiuj ni denove informos vin. Nun ni instigas la grupojn agi same por ke UNUE NI konvinkigu pri la taŭgeco de la internacia lingvo Esperanto.

Pako la tria

RECENZOJ

"Adopto kaj Omaĝo al Prof. Juan Régulo Pérez. La Laguna, 1984. 70 paĝoj".

La enhavo de tiu grava libro, eldonita sub la patroneco de la urbestro de La Laguna, rilatas al disertacio farita de s-ro Juan Régulo Pérez okaze de lia publika adoptiĝo kiel filo de la urbo La Laguna, kaj la respondoj de la Rektoro de la Universitato de la Laguna kaj de ĝia Urbestro. La akto okazis la 26an de Oktobro de 1984.


Tiu okazaĵo, laŭ la omaĝito J. Régulo, estas la plej grava el lia vivo. Ĝi estis malfrua reago al maljustaĵo farita de la hispana totalisma diktaturo. Dum la diktaturo ĉiam pendis super li la glavo de Damoklo pro la kulpenketo kaj deklaro, ke li estas kontraŭulo de la "Nacia Movado". Meritita reĝustigo, kvankam prokrastita.

G.M.E.

ESPERANTO EN LA RADIO

La pasinta 16-an de aprilo kaj per "Radio Cadena Española" de Valladolid, d-rino Rafaela Urueña, membro de la E-Grupo "FIDO KAJ ESPERO" kaj estraranino de H.E.F. por la aŭtonoma komunumo Kastilio-Leono, estis intervjuata dum preskaŭ duonhoru pri Esperanto, parolante pri la nunjara Kongreso okazonta en Vigo, la Jubilea Hispana Kongreso de Esperanto okazonta venontjare en Madrid sub la Honora Prezidanteco de Lia Reĝa Moŝto Juan Carlos kaj pri la situacio de la E-movado en Valladolid.

kooperativo de
LITERATURA FOIRO
kultura produktado en esperanto



Literatura Foiro baldaŭ atingos sian centan numeron: la jubileo de Esperanto koincidos kun la jubileo de la plej grava literatura revuo en la internacia lingvo.

Sub la ĉefredakto de Perla Martinelli, **Literatura Foiro** fariĝis ankaŭ nia grafike plej elstara periodaĵo. Okazas ke legantoj skribas: "Ni vere bezonus en nia nacia lingvo tian revuon kia estas **Literatura foiro!**" (la nacia lingvo de tiuj gratulantoj estas parolata de pli ol 200 milionoj da homoj).

En **Literatura Foiro** trovas grandan atenton ankaŭ la gravaj kulturaj eventoj en la ibera duoninsulo, unuavice la **Internaciaj Floraj Ludoj**, organizataj ĉiujare de Kataluna Esperanto-Asocio. Sed ankaŭ hispanaj verkistoj, kiel Miguel Gutierrez Aduriz, Julio Juanes kaj José F. Arroyo kontribuis per siaj originalaĵoj al la enhavo de la revuo. Fine, ankaŭ Latin-Ameriko ludis certan rolon sur la paĝoj de **Literatura Foiro**: Borges, García Marquez, Carpentier kaj aliaj populariĝis en Esperantujo danke al LF.

Literatura Foiro estas la organo de LF-koop (Svislando), kiu produktas ankaŭ librojn (**Infero**, **Kalevala** ktp), diskojn kaj kasedojn (de Olivier Tzaut, Johán Valano, Gianfranco Molle) .

Literatura Foiro estas abonebla interalie tra S-ro Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila, 127, portal, 7, 2º, izda. 39007 – Santander (Cantabria) Jarabono: 1.800 pesetojn.

**FUNDACION "ESPERANTO"
INTERNACIA LITERATURA KONKURSO**

La Patronaro de la "Fundación Esperanto" decidis dum kunsido okazinta la 8an de marto de 1986, organizi Internacian Literaturan Konkurson en Esperanto.

Estos premio kaj subpremio.

**P R E M I O
"SANCHO REBULLIDA"**

Premio, 12.000 pesetoj kun konfirma diplomo.

Subpremio, 6.000 pesetoj kun konfirma diplomo.

Oni aljuĝos la premiojn al la du plej bonaj originalaj verkoj libervole elektitaj en la temoj: "Popolo Rakonto" aŭ "Priskribo pri urbo aŭ regiono kun la monumentoj kaj tradiciaj festoj kaj moroj".

R E G U L A R O

- 1) – Ĉiu konkursaĵo ampleksu 4-6 foliojn (paĝojn).
- 2) – Ĉiu konkursanto sendu kvin ekzemplerojn de la konkursaĵo tajpitajn laŭ duoblaj interlinioj.
- 3) – La konkursaĵoj estu subskribitaj per pseŭdonimo por kaŝi la identecon de la konkursanto, kaj en aparta fermita koverto, surhavanta la identigan pseŭdonimon, estu slipo kun la nomo kaj adreso de la konkursanto.
- 4) – Kiam publikiĝos la Verdikto, publikiĝos samtempe la nomoj de la juĝintoj.
- 5) – La dat-limo (laŭ la poŝtstampo) por sendi la konkurantaĵojn estas la 15a de septembro 1986.

La Verdikto publikiĝos en la TAGO de Zamenhof, la 15an de decembro 1986.

Kun la indiko: Por la Konkursado de "Fundación Esperanto"; oni sendu la tekstojn al: Inés Gastón, Pº de la Constitución, 35, 4º dcha. 50001 – ZARAGOZA. HISPANUJO.

Zaragoza la 8an de marto de 1986

Inés Gastón
Sekretariino de la
"Fundación Esperanto" kaj de la Konkursado

100 ESPERANTISTOJ

Jen la listo de Aliĝintoj ĝis la 9a de majo

GRUPOJ

| | |
|----------------------------------------|---|
| Asociación Cántabra de Esperanto | 5 |
| Madrida Esperanto Liceo | 2 |
| Barcelona Esperanto-Centro | 1 |
| Grupo Esperantista de Alicante | 1 |

Individuaj aliĝoj

Luis M. Hernández Yzal, Alfonso Escamilla, Jordi Ortega, Nuria Gallés, Miguel A. Altuna, Charo Ortega, Abel Ursueguía, José Franquesa, F. Hernández Gil, Ben Parkinson, F. Ramirez Baldovi, M. Dolores Pérez, Félix Navarro, José Año, M. López Hernández, J.A. del Barrio, R. Felipe Albert, Jorge Camacho, F. Gómez Martín, Gerardo Flores, Gian Carlo Fighiera, Adonis González, Julio Argüelles, J. García Alvarez, F. de la Puente Solsona, M. López Serna, Rodolfo Canet kaj Giordano Moya.

La "Literatura Fako" havas la esperon ricevi la senkondiĉan apogon de ĉiuj hispanaj Esperanto-grupoj.

M.G. Adúriz

KUNVENO DE LA PATRONARO DE LA "FUNDACIÓN ESPERANTO"

La pasintan 8an de marto, okazis en Zaragozo la jara kunveno de la membroj de la patronaro de "FUNDACION ESPERANTO".

La tagordo estis la jena: Financa raporto. Raporto pri la antaŭaj I.L.K. Ŝanĝo de la membroj de la patronaro laŭstatute. Kaj demandoj kaj sugestoj.

Ĉeestis la kunvenon: Victor Ruiz, M. Pilar Sancho, Inés Gastón kaj Salvador Aragay kiel HEF—Prezidanto.

Oni elektis por la nuna jaro la premion "SANCHO REBULLIDA" (Vidu paĝon 22an) kaj estis elektita la jena patronaro.

Prezidanto: Salvador Aragay

Sekretariino: Inés Gastón

Administranto: Victor Ortiz

Voĉdonantoj: M. Pilar Sancho, Rafaela Urueña, Adonis González kaj Tomás Caspe.

46a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

VIGO de la 15a ĝis la 20a de julio

KONGRESEJO

Centro Cultural de la Caja de Ahorros Municipal de Vigo
Strato, Policarpio Sanz 13

RESTADEJO

San Francisco de Asís, strato Llorente 22, Tel. 42 31 48

ĈEFTEMO DE LA KONGRESO

ESPERANTO KAJ LA INTERNACIA JARO DE LA PACO

KONGRESPROGRAMO

- | | | |
|----------------|-------|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| MARDON 15an | 10 h. | Disdonado de dokumentoj |
| | 18 h. | Interkona vespero. Urba vizito |
| MERKREDON 16an | 10 h. | Kunsido de la HEF-estraro kun delegitoj de E-Asocioj. (Salono Rafael Herrero) |
| | 12 h. | Inaŭguro de la 46a H.K.E. (Salono Zamenhof). Salutparolado de la prezidanto de la L.K.K., de la HEF-prezidanto kaj salutoj de la reprezentantoj kaj delegitoj. Malfermo de la kongreso fare de la registrara reprezentanto. Festparolado, s-ro Xesús Adolfo Montero. |
| | 17 h. | Artaj kaj Sciencaj Horoj. (Salono Petro Nuez) |
| | 18 h. | Malfermo de la Libroservo de HEF. |
| | 19 h. | Fakaj kunveno: HEJS, IFEF, ILEI. (Salono Salvador Oliván) |
| JAŬDON 17an | 10 h. | Fakaj kunvenoj: Tutmonde, Bahai, Junaj Verkistoj, Vegeraranoj ktp. (Salono Salvador Oliván) |
| | 12 h. | Artaj kaj Sciencaj Horoj. (Salono Petro Nuez) |
| | 16 h. | Folklora Festo, vizito Grove, Toja, Sarxenso k.a. |
| VENDREDON 18an | 10 h. | Laborkunsido pri la Centjara Datreveno de Esperanto. Esperanto-Kongresoj kaj Esperanto-Renkontiĝoj en Hispanio. Novaj Libroj. La- |

- borplano por la jaro 1987. **Prezentado de novaj E-verkoj: SFEROJ-4, Astura verko, k.a. (Salono Emilio Gastón)**
- 12 h. Prelego en Esperanto, s-ro Antonio Alonso Núñez pri: "Nova baldaŭa revolucio: Informatiko en la hejmo".
- 17 h. Ekzamenoj: Kapabla kaj Instruista Esperantisto. (Salono Petro Nuez)
- 18 h. Elementa Esperanto-Kurso. (Salono Rafael Herrero)
- SABATON 19an 11 h. Kunsido de la HEF-estraro kun delegitoj de E-E-Asocioj. Tagordo: Jara raporto. Financa informo, Tagordo de la Ĝenerala Kunveno de HEF. Laborplano por la jaro 1987. (Salono Emilio Gastón)
- 13 h. Oficiala akcepto de la urbaj aŭtoritatoj
- 17 h. ĜENERALA KUNVENO DE H.E.F. (Salono Zamenhof)
- DIMANĈON 20an 10 h. Tuttaga ekskurso al la "CIUDAD DEPORTIVA del Círculo Mercantil. Bankedo. PREMIO Klara Silbernik. FERMO DE LA KONGRESO.

1a ASTURA KONGRESO DE ESPERANTO NAVIA 27 — 29 Junio 1986

- VENDREDON 27an 18 h. Akcepto de la gekongresanoj kaj disdonado de dokumentoj, en Lernejo "Ramón de Campoamor", Avenuo Manuel Suárez, kaj Interkona Vespero, en la sama loko.
- SABATON 28an 11 h. Ekzamenoj fare de I.L.E.I., en Lernejo "Ramón de Campoamor".
- 18 h. Malfermo de la Kongreso, en Kinejo Fantasio, Avenuo José Antonio. Post la malfermo salutoj de la Delegitoj de Grupoj kaj Sekcioj.
- 20 h. Folkloro Festo kaj disdonado de Diplomoj al la ekzamenitoj.

- DIMANĈON 29an** 10 h. Sankta Meso en Esperanto, en la Paroka Preĝejo, strato Parroco Trueĝa.
- 11 h. Interparolado en Esperanto pri: "La Eŭropa Ekonomika Komunumo bezonas nian Internacian Lingvon", fare de s-ano J. C. Chapuli Motta, prezidanto de L.K. K.
- 13 h. Laborkunsido de la Gekongresanoj kaj finaj konkludoj. Ĉi tiuj lastaj programeroj okazos en la Kazino de Navia, Avenuo José Antonio.
- 15 h. Bankedo en restoracio "Hostal Blanco", strato Colorada, s/n. Adiaŭo!.

NOTOJ.—

Por loĝado, bonvolu skribi al la L.K.K., strato Mariano Luiña, 17. NAVIA (Asturias)

Kiel alveni al Navia.— De Galegio pere de la fervojo Ferrol-Gijón, rekte ĝis Navia. De aliaj regionoj el Hispanio, estas pli bone iri al Gijón kaj de tie, pere de aŭtobusoj aŭ fervojo estas tre facile iri ĝis Navia.

RECENZOJ

AMO KAJ MORTO EN BALIO (1937 de Vicki Baum (1888–1960)

El la germana tradukis P.H. Mooij. Roterdamo: UEA, 1986. 420 p. Formato A5, kun kovrilo speciale desegnita de Peter Oliver. ISBN 92 9017 033 6. Prezo 1775 p-toj. Mendu ĉe Libroservo de HEF.

Ĝi estas verko pri la aŭtentika tradicia vivo de la balianoj kaj ties moroj. En formo de romano, ĝi rakontas pri homaj sortoj dum historiaj okazaĵoj ĉirkaŭ la renkontiĝo kun la nederlanda kolonia potenco en la pasinta jarcento.

Jam de ekstere tiu volumo tre longe impresas... kaj vere: temas pri Esperanta versio de unu el la plej bonfamaj verkaĵoj de Vicki Baum, —aŭtorino anatemita de la nazioj— kio ja atestas pri eksteordinara valoro.

La traduko de P.H. Mooij, meritplena esperantisto, estas elstare flua, lingve kaj stile senriproĉa, facile komprenebla, sen superflua neologismoj. La listo de la indiĝenlingvaj vortoj, necesas pro la unikeco de la objektoj kaj nocioj, kiujn ili signifas, ampleksas nur duonan centon da eroj, modera rilato al 417 paĝoj da teksto.

Tiu teksto prezentiĝas tre korekte presita, en bela tipografio sur bonkvalita papero.

D-ro Karl Beckman (Vieno)

CAJA DE AHORROS MUNICIPAL DE VIGO

GBV/lm. VIGO, 24 de febrero 1.986



Central Auto. Grupos de Ahorro: 1- 0000
Teléfono: 31122- 1111
31123- 1111

Telegrams: CAJA DE AHORROS
TELEGRAMS: 03070 CAJAVIG

C. I. P. 0 30000000

Nuevo Teléfono: 03 11 20

COMITE ORGANIZADOR DEL 46º CONGRESO
DE HISPANA ESPERANTO FEDERACIO

Círculo Mercantil.
Príncipe, 44

VIGO-2

RF#: CENTRO CULTURAL CAJA DE AHORROS DE VIGO-AUDITORIO

Muy señores nuestros: Con sumo agrado correspondemos a su att. carta, fecha 30 de diciembre ppdo. y, en relación con su contenido nos es grato participarles que reservamos las fechas del 15 al 20 de julio del presente año, para la celebración de los actos oficiales de su 46 Congreso de Esperanto, en el Auditorio del Centro de referencia, salvo que por causas de fuerza mayor tuviéramos que incumplir nuestro compromiso, en cuyo caso nos pondríamos de nuevo en contacto con usted a la mayor brevedad posible.

La subvención concedida para el citado Congreso es de 50.000,- pesetas, incluyendo igualmente la donación de carpetas para los congresistas y la impresión de carteles, por lo que les agradeceremos se sirvan facilitarnos con la suficiente antelación los datos necesarios para la confección de los mismos.

Les rogamos que en la difusión publicitaria que puedan realizar de este acto, hagan constar correctamente el nombre de la referencia.

Con este motivo, les saludamos muy atentamente.

CAJA DE AHORROS MUNICIPAL DE VIGO.

g

[Handwritten signature]

DEZIRAS KORESPONDI

S-ino Inghan, 56 Granny Hall Lane Brighouse, West Yorkshire HD16 2JC (Anglio).

Hungaro, 18 jaraĝa, membro de la Slovaka Esperanto Asocio, volas havi novajn geamikojn, ĉefe junajn amikinojn. Fehér Sandor 961 020 NI TRA. Obdokovce 152 (Ĉeĥoslovakio).

ESPERANTO PAU-ADOUR

KULTURO-TURISMO-DISTRO

La INTERNACIA KULTURA kaj TURISMA SEMAJNO (I.K.T.S.) okazos en PAU (Paŭo); en sudokcidenta Francio de mardo 22a de julio, ĝis mardo 28a de julio 1986.

Prezoj: 1400 kaj 2200 frankoj, laŭ aĝo (25 j.) kaj aliĝdato. Enestas: 7 plenaj tagoj (ĉambro, manĝoj) 6 ekskursoj kaj urbvizitoj, ... muzeoj, kulturaj aranĝoj.

Tuj petu plenajn informojn al:

ESPERANTO PAU – ADOUR, C. S. Pépinière

Av. R. Shuman, F-64000 PAU, FRANCIO.

“CURSO ELEMENTAL DE ESPERANTO” de nia elstara forpasinto PETRO NUEZ PEREZ atingas la 10an eldonon.



Lernolibro tre adekvata por esperanto-kursoj. Ĝi enhavas informojn pri esperantismo, esperantan gramatikon, multajn ekzercojn kastilia-esperantajn kaj inverse, kaj demandaron en ambaŭ lingvoj.

54 duoblaj paĝoj broŝuritaj. Prezo 350 p-toj. Mendu ĝin ĉe Graf. “El Tinell”, Freneria, 1, 08002 Barcelona (Hispanio)